

Akademio Internacia de la Sciencoj

Oprof Amri Wandel

Prezidanto _____



Novjara mesaĝo al AIS-anoj, decembro 2018

Estimataj membroj kaj kunlaborantoj de AIS,

Por la nova jaro 2019 mi deziras feliĉon, sanon kaj plenumon de niaj revoj kaj planoj. Dum la baldaŭ finiĝonta jaro AIS daŭrigis la elanon de la antaŭa jaro, sukcese organizinte la SUS35 en San Marino kaj la AIS-IKU-sesion dum la UK en Lisbono. Jam estas planata la venonta SUS36 kadre de BET en Litovio:
<http://sezonoj.ru/2018/11/bet-69/>.

La 35-an Sanmarinecan Universitatan Sesion (SUS) mi organizis kadre de la 85-a Itala E-Kongreso, kun AIS-kursoj far Astori, Bodieva, Tonkin kaj Wandel, kun rekordaj nombroj de aŭskultantoj (aldona la artikolo pri ĝi en la oktobra n-ro de revuo Esperanto).

Kiel ĉiujare, mi kunordigis la sciencan programon dum la UK en Lisbono. Aldone artikolo pri ĝi en revuo Esperanto (aperinta en la septembra n-ro). Krom la kutimaj programeroj de AIS dum la UK (AIS-IKU kursoj kaj Scienca Forumo) okazis en Lisbono ankaŭ la disdono de Premio Pirlot, kiun mi renovigis en 2016. Estis disdonitaj 12 premioj en kvar kategorioj: libro, artikolo, prelego kaj kurso.

Sub aŭspicio de AIS kaj UEA mi redaktis kaj eldonis la IKU-libron, en kiu aperas la plenaj tekstoj de la naŭ IKU-prelegoj kaj la tri AIS-IKU kursoj. Unuafoje sur ĝia kovrilo aperas la AIS-emblemo, apud tiu de UEA. La ĉi-jara IKU-libro estas la plej ampleksa iam, kun pli ol 220 paĝoj. Ĉiuj 100 ekzempleroj elĉerpiĝis dum la UK, sed la libro estis represita kaj denove aĉeteblas ĉe UEA por 18 eŭroj. AIS-anoj povas ĝin akiri je rabatita prezo de 15 eŭroj (mendu ĉe informo@ais-sanmarino.org).

La 27.12 komenciĝos apud Frankfurto la Novjara Renkontiĝo, dum kiu mi organizos la 12-an sesion de la Internacia Vintra Universitato (IVU). Vidu la programon http://www.esperantoland.org/dosieroj/NR_18_19_Programo_provizora_20a12a18.pdf. Ĉi-jare IVU okazos paralele ankaŭ dum Luminesk, apud Bonn, sub gvido de Kiki Tytgat.

En julio 2019 okazos en Lahtio la kutima AIS-IKU-sesio, al kiu vi estas bonvenaj proponi prelegon (ĝis la 31-a de januaro, bv. sendi resumon kaj biografieton al amri@huji.ac.il). Komence de julio okazos la 36-a SUS dum BET-55 (Baltiaj E-tagoj) en Litovio. Vi estas bonvena proponi kurson/prelegon, bv. sendi proponon al la sama adreso.

En la pasintjara novjara cirkulero mi rakontis pri la 3-a eldono de la libro "Kosmo kaj ni" (David Galadi kaj A. Wandel). Ĝi inkludas novan ĉapitron pri astrobiologio kaj gajnis la unuan Premion Pirlot por la plej bona scienca libro en 2018. Aĉetebla ĉe UEA kontraŭ 18 eŭroj, sed AIS-anoj povas ĝin ricevi por 15 eŭroj.

Fine, ĉar AIS ne plu petas la jarkotizon (0.1 AKU aŭ 6,50 eŭroj), gravas via libervola subteno. Donackvitancojn laŭ la germana impostleĝo eblas peti al trezoristo@ais-sanmarino.org. Eblas pagi per la UEA-konto de AIS (aisc-j), la Paypal-konto de AIS, kreditkartoj aŭ la AIS-hejmpaĝo <http://www.ais-sanmarino.org/>.

Amike,

Amri